

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Juni 1946

34 årg. Nr 6

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

Årets esperantokongress hålles å Bohusgården i Uddevalla under pingsten.

Ur programmet, som återgavs i majnumret, erinras om följande:

- | | | |
|------|-------|---|
| 8/6 | 15.00 | Kongressbyrån öppnas |
| | 19.00 | SEF:s årsmöte öppnas (se dagordning punkt 1—7) |
| 9/6 | 09.00 | Förlagsföreningen Esperanto håller årsstämma |
| | 10.00 | SEF:s årsmöte fortsätter (se dagordning punkt 8—21) |
| 10/6 | 10.00 | Svenska Lärares Esperantoförbund håller årsmöte. |

Förslag till

DAGORDNING VID FÖRBUNDSMÖTET 1946.

1. Ordf. i Uddevalla Esp. Förening välkomnar.
2. Tal av förbundsordföranden.
3. Fastställande av dagordningen.
4. Val av mötesfunktionärer.
5. Val av ombud till Förlagsföreningens årsstämma.
6. Hälsningar av föreningarnas representanter.
7. Justering av röstlängden.
8. Styrelsens berättelse.
9. Revisorernas berättelse.
10. Fråga om ansvarsfrihet för styrelsen.
11. Val av styrelsemedlemmar: Vice ordförande, sekreterare och en suppleant.
12. Val av 2 revisorer och 2 suppleanter för dcssa.
13. Diskussion ang. SEF:s arbetslinjer. Behandling av styrelsens förslag ang. sektioner inom SEF.
14. Övriga motioner.
15. Fråga om arvode åt funktionärerna.
16. Arsavgiftens storlek för år 1947.
17. Rapport om I E L.
18. Rapport om Svenska Esperanto Institutet.
19. Val av styrelsemedlem och suppleant i Institutet.
20. Beslut ang. plats för årsmötet 1947.
21. Eventuella frågor.

UDDEVALLA — LA KONGRESURBO.

La historiaj dokumentoj rakontas, ke Uddevalla ricevis la urbajn privilegiojn 1498, sed verŝajne ĝi urbiĝis kelkajn jardekojn pli frue.

La provinco Bohuslän dum longaj tempoj apartenis al Danujo, kaj nur en la jaro 1658 ĝi svedigis. La statuo de reĝo Karlo X kaj lia ministro Erik Dahlberg ornamas hodiaŭ la Reĝan placon.

La fajro estis la detruinto de multaj svedaj urbetoj, kaj en la jaro 1806 ĝi forbruligis preskaŭ ĉiujn domojn de Uddevalla. Nur kvar estis savataj.

Uddevalla estas kiel Romo la urbo de la sep montoj, kaj tra ĝi la rivereto Bäveån fluas, borderita de majestaj tilioj.

La situo ĉe la mara bordo de Byfjorden kreis havenon, kiu jam en malnovaj tempoj estis tre grava pro granda eksporto de ligno, fero, fiŝo kaj aveno.

Sed ne forlasu la pasintecon kaj rigardu la nunon. Uddevalla estas moderna kaj evoluema. Sed restas multaj idiliaj partoj. Ekzemple Gustafsberg, la fama banloko, kiu dum jarcentoj allogis gastojn. Perŝipe ni faros ekskurson sur la fjordon kaj faros viziton ĉe Gustafsberg. Se ni grimpas sur unu el la montoj, ni havas ravan elrigardon: tie ĉe la horizonto la molaj linioj de la senarabaj rokegoj kaj arbohavaĵoj insuletoj — tie la bluverda marsupraĵo, kelkfoje kiel spegulo, kiu reĵetas la orajn radiojn de la subiranta suno, kelkfoje ŝaŭmanta kaj ondeganta, kiam la ventego vipas la akvon. Inter la montetoj ni vidas la urbopartojn kaj ankaŭ sur la rokaj deklivoj de la montoj kuraĝuloj konstruis siajn hejmetojn, kaj ĉirkaŭis ilin per ĝardenoj.

Multaj enlandanoj per ĉiaj komunikiloj veturas al Uddevalla, kiam la somera suno varmigas la maron. Ni havas komunuman liberaeran banejon Skeppsviken, kiu estas tre ŝatata, kaj ni kore esperas, ke la pentekosto estos tia, ke la kongresanoj havos eblon ekzameni la avantaĝojn de la banejo, kaj ĝui la banplezurojn.

Bohusgården, kie la kongreso okazos, estas konstruaĵo, kiun Uddevalla donacis al la Asocio Norden. Ĝi situas sur monto alte super la fjordo, kaj pinoj kreskas ĉirkaŭ ĝi. La konstruaĵo enhavas restoracion kaj krome dulitajn ĉambretojn. Ĉio estas moderne aranĝita kaj simple praktika. Ne lukson vi trovos sed hejmeccan atmosferon. Kaj nun ni atendas la invadon kaj akceptas la aliĝojn kiel eble plej baldaŭ, por ke la aranĝoj estu plejeble perfektaj. Kaj se vi ne havus okazon vojaĝi al la kongreso, sendu tamen la monon, kaj ni sendos al vi la kongresajn paperojn. Ede.

Somera universitato.

Uddevalla 10—15 junio.

La programo de la Somera Universitato enhavas la sekvantan liston de prelegistoj kaj iliaj temoj:

Einar Adamson, Göteborg:

"Unuigitaj Nacioj kaj la kultura laboro post la milito." "Kultura konkurenco inter grandaj kaj malgrandaj ŝtatoj."

Bjarne Beckman, Strängnäs:

"Problemoj de la historia instruado dum la postmilita tempo." "Vojaĝo al Nederlando."

Einar Dahl, Uddevalla:

"Lernejo — paco — Esperanto."

E. Malmgren, Stockholm,

"La Esperanto-movado dum la milito." "La internacia organiza problemo de Esperanto."

Margarethe Noll, Kopenhago:

"La ideaj movadoj en Danujo." "Kompreno, nekomprene, miskompreno."

Vilho Setälä, Helsinki:

"Tastoj kaj problemoj de la internacia kulturlaboro postmilita." "Esprimrimedoj de arta fotografado."

J. Stenström, Ulricehamn:

"La lingvoj de la venko kaj de la paco."

Jan Strönne, Malmö:

"Ĉu nova mondo en la signo de la atomenergio."

C. Støp-Bowitz, Oslo:

"La idealistaj movadoj dum la milito en Norvegujo." "Mirindaĵoj el la besta vivo."

Fr. Szilagy, Budapest:

"La zamenhofa idearo kaj la rooseveltaj principoj." "Pacifismo kaj socialismo en nia literaturo." "Rifuĝintoj kaj Esperanto."

Karl Söderberg, Uppsala:

"Inaŭgura prelego de la Somera Universitato."

*

La prelegoj okazos matene kaj vespere. Dum la tagmezoj la kursanoj povos amuzi sin per ekskursoj, ŝipveturoj, banado kaj amika kunestado.

Loĝo kaj manĝo ĉiutage 7: 50 kr. Kurskotizo 5: — kr. Sendu vian aliĝon al Somera Universitato, Box 900, Uddevalla.

Somerkursoj en Danlando.

En la antaŭa numero de i ĉi tiu gazeto vi legis anoncon pri la someraj kursoj en Danlando. Ni esperas, ke post nia multjara izoliteco multaj svedaj gesamideanoj venos por ĉeesti niajn aranĝojn.

Por ekhavi valuton svedan je nia dispono por eventuala ekskurso al Helsingborg kaj Kullen (aŭ Hveen) ni petas ĉiujn svedajn aliĝintojn pagi la kostojn de la kursarango laŭ taga kurzo al s-ino Clary Hansson, Sävstaholmsgatan 21, Malmö.

La kursoj en Helsingør okazos de 28/7—4/8. Tiuj en Hadsten de 13/7—20/7 kaj 20/7—27/7. Helsingør estas plej proksima al vi, sed kial ne veni al Hadsten (Jutlando, inter Aarhus kaj Randers), kiu havas same belan regionon kiel Hør? Jutlando vere estas vizitinda. En Helsingør granda parto de la kursanoj devos loĝi en dormsalonoj, en Hadsten oni povos ekhavi unupersonan ĉambron por la sama prezo, t. e. 63, —d. kr.

Se vi deziras veni, ne hezitu tro longe, ĉar jam multaj sin anoncis, precipe danoj, sed ankaŭ el Anglujo, Norvegujo, Finnlando kaj Belgujo kaj Nederlando.

Petu prospekton ĉe

s-ro L. Friis,
Ingemannsvej 9
Aabyhøj, Danlando.

Filatello — Esperanto-helpo.

Same kiel la filatelistoj uzas esperanton kiel helpilon, same la esperantistoj povas uzi la filatellon kiel helpilon. Vidu la anoncon de IAPK!

Alia ebleco estas ke esp-kluboj kolektu poŝtmarkojn kaj sendu ilin al la sveda estro de IAPK, s-ro Bertil Zell, Box 50 85, Göteborg 5. Ĉiuspecajn poŝtmarkojn (krom sub-25oeraj) li aĉetas, kaj la gajnon ricevos la kolektanta klubo. Monon oni ne malestimu!

Jursla-kurso 1946.



D:ro Szilagy prelegas.

Aliĝojn al la Jursla-kurso 14—20 juli 1946 akceptas Sven Ragnar, Odalgatan 20 B aŭ Norrköpings Esperantoklubb, Box 49, Norrköping.

Jam sin anoncis, krom svedoj, ankaŭ kelkaj gesamideanoj el Norvegujo, Nederlando kaj Finnlando. La kursoprogramo estos tre varia. Prelegistoj estos la aŭtoro Stellan Engholm kaj la jam anonciataj d:ro F. Szilagy kaj inĝeniero R. Kapper. La kurso ĉefe rigardos "La vizaĝo-n de la homaro antaŭ, dum kaj post la milito". Engholm gvidos promenon tra la stilistika problemaro. La kursanoj ankaŭ faros promenojn en la bela kaj sovaĝa arbaro. Oni povas sin bani en proksima lageto arbara. Estos cetere diversaj ludoj, konkursoj kaj amuza programo.

La partoprenontoj loĝos ĉe bonvolaj najbaroj de la somerhejmo. La kurskotizon, 5: — kronojn, oni prefere sendu al Norrk. Esp. klubb, poŝtgiro 87 503. La kosto por loĝo-manĝo estos 5: — kr. potage.

Ĉar la ebloj por la manĝoservado estas limigitaj, oni anoncu sin kiel eble plej frue.

Bonvenon por unusemajna vivado en malgranda Esperantujo!

Loka kursa komitato.

La Sveda Eldonejo "Esperanto".

El la jarraporto por 1945.

La paco jam dum la somero 1945 donis al la esperanta libro-merkato certan ekfloradon, kvankam la valut-malfacilaĵoj ja devas esti granda malhelpo por la internacia kunlaboro.

Notindaj eldonaĵoj dum la jaro:

"La Fino" de Folke Bernadotte, tradukita de Stellan Engholm, 144 paĝoj kun 8 bildfolioj.

"La Granda Aventuro" de F. Szilagy, 144 p. Sveda ŝlosilo 5000 ekz.

Dum la jaro oni komencis la eldonon de "Lernolibro por la lernejo" de Einar Dahl en kunlaboro kun la "Fondo de Winberg".

La eldonejo havis — kiel kutime — sur si la taskon eldoni la organon de la Sveda Esperanto-Asocio "La Espero", kiu dum 1945 estis presita en 24.550 ekz, el tiuj por speciala septembra numero 7000 ekz. Kiel redaktoro restis s:ino Eva Julin.

La jara ekonomio balanciĝas je svedaj kronoj 36.112 kaj donas denove malgrandan, sed tamen gajnon de kr. 217. La eldon-ĉefo, s:ro Bernhard Eriksson, anonciasian deziron esti libera post pli ol 20 jaroj kiel membro de la eldon-estraro.

LINGVA KOLONO.

La Batalpomoj.

Ŝajnas al mi ke diskuto pri ŝanĝoj en esperanto ne estas inda al aktivaj esperantistoj. Ĉar la unu havas tiun guston, alia havas alian guston. "Kaj pri gustoj oni ne disputu!"

Aktiva esperantisto en sia esp-laboro havas unu ĉefan celon: Kiom eble plej akceli la venkon de esperanto. Ĉu enkonduko de ŝanĝoj akcelus tiun venkon? Konataj faktoj el la mondlingva movado atestas forte kontraŭ tia supozo.

Se oni volas akceli la venkon de esperanto, oni certe povus enkonduki diversajn plibonigojn, tamen ne en la fundamenton de la lingvo, sed en la labormetodoj, en la studmaterialo, literaturo, vortaroj, ktp. Mi volas doni kelkajn ekzemplojn:

1. La lerniloj devas esti krom eble facilaj, allogaj kaj samtempe kompletaj por ke ĉiu eklerninto estu se eble ankaŭ ellerninto.

2. Oni ĉiam atentu pri la novaj esperantistoj en gazetoj kaj literaturo: Esperantajn tekstojn oni presigu per pli grandaj literoj ol nacilingvajn tekstojn. Nun oni agas plejofte kontraŭe. La ellaso de apostrofo en la poemoj ankaŭ konfuzas la komencinton, ĉar kien meti la akcenton? Kaj kiel ĉiam trovi la radikon en la vortaro? Sekve tiu ŝanĝo ne estas plibonigo, sed male. Kaj la naci-esp-vortaroj: Eklerninto de nacia lingvo baldaŭ trovas la vortojn en sia vortaro laŭ la strikte alfabeto ordo, sed en la esp-vortaro multaj malhelpaĵoj malhelpas. Tiu kiu ne jam konas diversajn lingvojn ne rekonas la esp-radikojn en kunmetitaj vortoj kaj ofte vane devas serĉi ilin. Ili ja estas troveblaj nur sub la komenclitero de unu el la lastaj radikoj de la vorto. Mi mem povis legi esperanton pere de vortaro nur finlerninte la tutan vortprovizon de tiamaj (1915) lernolibroj de Nylén kaj Backman, ĉar ĝi estis mia unua fremdlingvo. Cetere tiu kiu skribas vortarojn, speciale naci-esp:ajn, devas favori facile memoreblajn vortojn, speciale kiam temas pri botanikaj aŭ bestaj nomoj. Eble oni povus traduki en esperanton laŭ origina signifo la nun uzatajn latindevenajn nomojn.

Do, se oni faras plibonigojn, oni faru nedisputeblajn kaj necesajn plibonigojn kaj ne ĥimerajn.

F. L.

Batalpometoj II

Unue kelkajn vortojn responde al Setälä. Dum mia esperantista periodo (de 1935) almenaŭ en ĉituu gazeto ne aperis ia vivsigno el la Akademio. Tial oni ja ne scias ĉu ĝi funkcias. Via propono eho anstataŭ eho ŝajnas akceptebla. Mi memoras ke konata eksterlanda esperantisto ĉiam diras ĉeĥa anstataŭ ĉeĥa. La punkto pri sh, ch, gh, ktp. koncernis nur provizoran aranĝon en gazetoj kiuj ankoraŭ ne havas la esperantosignojn. Cetere mi ne trovas tiun skribmanieron malbela. Kaj nun ankoraŭ kelkaj pometoj:

6. En poemoj oni kompreneble kiom eble plej multe uzu plenajn vortojn kaj ne apostrofu. Se oni forprenas la substantivan finaĵon oni tamen ne aldonu apostrofon, ĉar apostrofa abundo terure malbeligas poemon. Mi ĝojas ke ĉi tiu gazeto ofte sekvas tiujn principojn. En proza teksto tia mallongigo de vortoj estas nenecesa.

7. La kuntiro de l', kiu estas necesa nur en poezio, oni prefere skribu del pro sama kaŭzo kiel en la antaŭa punkto. Mi tamen ne proponas la samon por pri l' kaj aliaj.

8. La karesnoma sufikso —ĉj— ĉiam naŭzas min. Kontraŭe —nj— tre bele sonas. La strangaj karesnomoj Peĉjo, Joĉjo, Kaĉjo donas la malon de agrabla intima sento kaj cetere memorigas pri vortoj kiaj kaĉo, aĉa, smaĉi, maĉi, feĉo. Inventu ni pli belan sufikson aŭ malhavu!

Salex.

Denove en libera danlando!

Hejmaj formalajoj.

Pasintjare, antaŭ mia forvojaĝo al Finnlando, mi devis kuradi al diversaj militaj kaj policaj aŭtoritatoj en Stokholmo por ricevi pasporton validan nur dum 3 semajnoj por Skandinavio, sed nun mi rapide ricevis pasporton por 5 jaroj kun vojaĝrajto al ĉiuj landoj, sen speciala vizito al milita estraro, tamen progreso paca... Ek...

Matena vekigo en Näs sjö neĝkovrita (la antaŭan tagon en Stokholmo plena suno kaj ĉe Engelbrektsplan la printempa birdotriilo de Humlegården superis la trafikbruon). Sabate matene je la 9-a horo en la fabriko de samideano Fejde: "Rang" oni prenas mian mezuron kaj jam je la 11-a horo jen du kostumoj provpretaj... Daŭrigo tagmeze. Posttagmeze je la kvara amiko Strönne helpas ĉe surpramigo. Dumil pasaĝeroj sur moderna "Malmöhus". Dano provas trairi svedan amason. Oni riproĉas lin, ke li provas trairi laŭ kontraŭa direkto. Li respondas trankvile: "Pardonu, ĉu vi ne povas fari vian rimarkon dire, ne krie?".

Alveno al Kopenhago

Esperantlingva laŭtparolilo de la havena stacio: "Sinjoro Morariu, prezentu vin en la vestiblo, S-ro M., prezentu vin en la vestiblo".

Afabla Eksterafero Ministerio disponigas al mi senpagan, liberan vojaĝkarton tra tuta Danlando, tiel por trajnoj kiel por ŝipoj. Dum mia lasta vizito en 1940 la germanaj malamikoj invadis Danlandon. Nun eĉ la rusaj amikoj forlasas feliĉan Danion. Kompreneble ĝenerala ĝojo. Nigras la militdrama skeleto de "Shell"-domo, gapas vundoj en la bela, joviala ĉefurbo. Sed suno ridetas al ĵus aperintaj blankaj neĝfloroj, bluj anemonoj, flavaj "erantis"-oj. Ĉie viglas refara laboro. Gajaj ŝercoj, kantoj. Viando 2—3 foje potage...

En Finnlando eble nur unufoje monate laŭ oficiala limigo... Malgraŭ konstanta veturado (9 konferencoj en 8 urboj) iskiatika atako ktp. dum preskaŭ nura semajno la subskribinto pliiĝis 2 kaj ½-an kilogramojn...

Dimanĉe antaŭtagmeze vizito al reprezentantino de Rumana Konsulejo. Posttagmeze parolado pri Turkio por 65 personoj en prelegejo de grava gazeto "Politiken". Ĝoje mi revidas nian verdan veteraninon-vegetarinon Noll, kiu pentekoste venos al Uddevalla. Mezlerneja instruisto Marstal dankas angle pro la prelego kaj aĉetas esperantan gramatikon.

Mia Kopenhaga mastro, s-ro Kuhlman, reprezentanto de Esp-a librovendejo, ĝoje raportas ke nia movado dum la milito konsiderinde kreskis. Lia edzino gvidas plurajn kursojn en la ĉefurbo, ricevante oficialan subtenon al la instruado kaj por premiado de la kursanoj.

Pluraj volas aĉeti — je kiu ajn prezo — mian horloĝon. Tipa afero por lando vizitita de certaj armeanoj. Tamen ĝi vendeblas je neniu prezo (= memoraĵo de instruista kurso en Jönköping).

Holbäck.

Geinstruistoj Holger Hanssen akceptas min kun ripeta gastamo. Dum la historia tago de la 10-a de aprilo 1940 ili telefone vokis min al sia loĝejo de mia hotelo. Nun ili transdonas al mi esperantajn lumbildojn depolitajn antaŭ 6 jaroj kaj kaŝitajn for de teŭtonaj vandoj.

Surstrate mi renkontas danan kamenpurigiston en kutima kostumo nigra kaj kun tradicia, nigra cilindro surkape dum la deĵoro...

Rakontado en la klubo por 30-o da samideanoj: "Kiel soldato kaj verdstelano dum la milito en Svedlando"...

Survoje al Aarhus

mi denove travivas neforgeseblan tagon sunriĉan surŝipe.

Samideano Rasmussen kondukas min al la hejmo de D-ro Eggerup, la verkinto de la moderna originala, romano esp-a "D-ro Dorner", kiu baldaŭ aperos ankaŭ en dana kaj finna lingvoj. Lia ĉarma filino, fraŭlino

Eggerup, baldaŭ venos al Svedlando por kelkmonata vizito.

Mi plendas, ke mia horloĝo difektigis. Horloĝista samideano tuj riparas ĝin. Parolado por 80 esperantistoj en urba biblioteko. Instruisto Friis, la fama estro de la someraj kursoj rebonvenigas min por gvidado de feriaj kursoj en Hadsten kaj en Helsingör (Internacia Altlernejo). Mi ĝoje akceptas la inviton kune kun mia filineto.

Randers

Instruisto Bagge interpretas (sen antaŭa preparo) lerte mian prelegon pri Rumanio por 20 esp-istoj kolektigitaj en "Wangs Hotell". Antaŭ najbara "Geštapejo" nun postenas dana soldato... Bela ilustrita, esp-a "Monda Revuo" aperas en Randers.

Vejle

Parolado pri Turkio por 20 verdstelanoj en hotelo "Grand". Malnova amiko, s-o Fink-Jenssen gastigas min. Intervjuo kun ĵurnalista samideano. H. C. Nielsen. Literatura kunveno ĉe familio Knudsen. Laŭ ĝenerala deziro laŭtlegado el "Sonorilo kaj kanono" de rumana verkisto Emil Isac.

Fredericia.

En restoracio "Fremad" (Framåt) 75 aŭskultas paroladon pri Rumanio. Instruisto S. K. Nielsen interpretas laŭ modelaj precizo kaj viglo. Favoraj raportoj en gazetaro. S-o Nielsen organizas aŭtobusajn karavanvojaĝojn de esp-istoj al Svedlando, Norvegio kaj Holando ĉi somere. (Apartan dankon pro bonkora prizorgo ges-roj N. helpis eĉ surmeton de ŝtrumpoj al okaze invalidiĝinta iskiatikulo...)

Kolding

Du lumbildparoladoj dimanĉe pri Rumanio por junularo organizitaj de sindona germana samideano Richert (dum 14 monatoj suferinta en koncentracia tendaro).

Esbjerg

S-o Graversen interpretas, instruisto Knudsen gastigas, kvankam li tre okupita pro komenco de nova lerneja jaro (1-a de Aprilo, ne ŝerco, en Danlando).

Ringköbing

German-dana paro Weide (trandukintoj de Synnöve Solbakken de Björnsson) renkontas min ĉe stacidomo. Kiam mi donacas moneron al 2-jara filineto de gesinj. Weide, ŝieto ĝoje ekkrias en esperanto: "mono!"

Ulfborg

100 rumanaj rifuĝintoj ĝojege akceptas sian samlandanon. Aŭskultado de deziroj, divido de cigaredoj ktp. Reveturo. (Entute 12 kaj ½-hora veturo samtage...)

Denove en Kopenhago

kie mi malĝoje aŭdas, ke planita Radio-parolado ne okazos pro ĵus ŝanĝita Radioestraro. Geamikoj Kuhlman adiaŭas. Mi petas ilin transdoni dankegon al la ĉefa vojaĝaranginto, fervojista samideano Christoferssen.

Reen al Svedlando

per granda, pura ŝipego sveda. Bone prizorgitaj, pacokonservitaj trajnoj elektraĵ. Banano ĉe ĉiu skaniaj staci-kioskoj (en Danlando nenui frukto ricevebla). La impresoj kunfluas kaose. Ĉu mi vere denove en kara hejmlando Sveda. Aŭ ĉu mi nur sonĝas en Danlando?

Denova halto en Nässjö, vizito fulma en novaĉetita, moderna vilao de familio Fejde. Vespermanĝo en "Stadshotellet". La kelnero ofendiĝas kiam gastoj plendas pri trablovo (pro malfermita ventilo)... Dormvagono ne ricevebla. Fervoja kasisto rekomendas pagi diferencon por 2-a klaso por povi dormi trankvile. Dufoje vekas min trokonsciaj biletkontrolistoj.

Ne, mi ne plu sonĝas. Mi denove estas en superorganizita, korektega Svedlando...

Tiberiu Morariu.

Pasero inter agloj aŭ kion

diris la eminentuloj.

Estas vintra vespero en la koro de Laponlando. En la porinfana laborhejmo kunvenas la loka estraro de la hejmo: fama kuracisto, la parohestro, la ĉefinstruisto, bonhava komercisto kaj pasera esperantisto. Pace oni pritraktas la pritraktotajn aferojn kaj faras siajn decidojn. Poste la hejma estrino alportas kafon kun bulkoj kaj kukoj.

La interparolo transiras al instruaj kaj lerneaj temoj kaj precipe oni pridiskutas la instrufakojn de la mezgrada lernejo. La intereso estas vigla kaj bone motivita, ĉar en la vilaĝo oni ekhavis perkorespondan realklason sub la gvido de bona instruisto. Elokvente la eminentuloj parolas pri la beleco de la franca lingvo kaj utileco de la angla, ĝis fine la esperantisto malfermas sian bekon kaj pepas:

— Laŭ mia opinio oni en la realklasoj tro malŝparas la tempon pro lingvoinstruo. Nur ege malgranda parto de la lernantoj daŭrigas siajn studojn post la mezgrada ekzameno. Do necesas ke la instruado estu kiel eble plej praktika kaj adaptita al la fundamentaj bezonoj de la vivo. La vastajn lingvistudojn kaj subtilajn teoriojn oni ŝparu al tiuj, kiuj povos grimpi pli supren sur la vojo de la klereco.

— Tamen vi komprenu ke sen lernado de fremda lingvo oni ne povas bone lerni sian propran, almenaŭ oni ne lernas ĝian gramatikon.

Eble, sed por tio ne necesas legi plurajn nacilingvojn, unu bone sufiĉas. Kaj eĉ tio estas pli ol ordinara lernanto kapablas enkapigi dum tiuj jaroj, nome se oni volas, ke li envere regu la lingvon post sia ekzameno. Cetere estus pli saĝe por tiu stadio enkonduki esperanton. Per ĝi la lernantoj ricevos la plej bonan gramatikan fundamenton kaj povos post la ekzameno perfekte regi sian "fremdan" lingvon, skribe kaj parole.

— Larĝa, laŭta ridego! Antaŭ la pasero la eminentuloj fariĝas agloj, kiuj per majestaj flugbatoj levas sin al la nuboj.

— Infana malsaĝaĵo! Krom esperanto oni ja havas vicon da aliaj samspecaj lignopiedaj artefaritaĵoj. Jen Ido kaj anglic kaj aliaj. Oni ja ne povas memori la nomojn de ĉiuj. Ne, ne! Kien vi povus vojaĝi helpe de esperanto? Nenien! La vera mondlingvo estas la angla. Per ĝi oni povas sin helpi ĉie en la mondo. Aŭdu ekzemplon! Vojaĝis tie ĉi franco, kiu por siaj studoj pri la hipoftizo kolektis preparaĵojn kaj por tiu celo vizitis boacbuĉejon. Li sciis nek la svedan nek la laponan lingvon, sed tamen li sukcesis. En la buĉejo nome okaze troviĝis iama maristo, kiu dum siaj marveturoj lernis la anglan lingvon kaj povis nun interpreti.

— Tamen ne sufiĉas tia "lingvo", kiu estas la angla volapükaĵo de la maristoj. Per esperanto oni povas esprimi ĉiujn nuancojn de la homa penso, kaj ĝi tiel bone vivas kiel iu ajn nacia lingvo.

La agloj svingas siajn flugilojn kaj moke blekas.

— Vi tamen ne lernis eĉ la unuajn elementojn de la lingvo, vi do ne rajtas prijuĝi ĝin. Tia maniero estas sensecaĵo.

— Silento.

La interparolo transglitas al politikaj aferoj, kaj kiam oni estas forironta, la parohestro esprimas timon antaŭ la tempo venonta. Al tio la kuracisto ironie rimarkas, ke ĝis tiam la homaro pere de esperanto certe interfratiĝos, kaj ĉio estos bona.

— Tio estas la sola espero de la mondo.

Mokrido.

Ĉiu foriras en sian direkton.

Ankaŭ la esperantisto iras hejmen. Li bone konas siajn kunulojn kaj ne miras. Ili tamen ne estas tiel malicaj, kiel oni povus kredi. Sed tia ja estas la grandparto de la "kleruloj".

La postan vesperon li sin trovos en alia rondo. Tiam en lia ĉambro kolektiĝos areto de ordinara laboristoj kiuj, por elrompiĝi el sia izoleco, post la taga laboro kun fervoro studas tion, kion la eminentuloj forĵetis. Kaj ĉirkaŭe en la mondo ili havas animajn gefratojn.

Iam tamen venos ilia tago.

La pasero.

Rakonto pri vojaĝo en okupitaj landoj

(Daŭrigo.)

de Ella Nilson.

La plej terura tago dum la tuta milito estis la 27a de majo 1940, kiam la Narvik-anoj kun helpo de angloj kaj francoj reprenis sian urbon, kiun tamen la germanoj post nur kelkaj tagoj denove konkeris. En tiu tago la urbo estis flamanta infero kaj oni povis nombri ducent bombatakojn en dek minutoj. Precipe multaj francoj estis mortigitaj. La hospitalo kaj provizoraj malsanulejoj estis plenplenaj kaj portiloj kun vunditoj staris en longaj vicoj ekstere sur la trotuaroj. Multaj civiluloj estas entombigitaj, pro manko de alia loko, en la proksimeco de la preĝejo, kies fenestroj estas dispaŝitaj kaj provizore anstataŭigitaj.

Malgraŭ multa suferado kaj ĉagreno la norvegoj estas optimismaj koncerne la estonton. Ili ĝojas pri la libereco, pri la lumoj, kiuj denove brilas, pri la proksimiĝanta Kristnasko, kiun oni povos festi en kvieto kaj trankvilo. La manĝa situacio ja nun estas multe pli bona, oni ricevas iom da sukero kaj sveda margarino, blankan panon kaj kvindek gramojn da kafo posemajne. Precipe oni ĝojas pri la kafo kaj la pano, kiuj dum la milito estis preskaŭ nekonsumeblaj. La kafo estis ia mistika fluidaĵo el hordeo kaj terpomaj ŝeloj, kaj la pano konsistis el ia glueca maso, kiu rapide malmoligis kaj brulis en la forno kiel tindro.

Estas manko de viando, nur iom da ĉevalaĵo oni ricevas. Kelkaj kolbasoj pendis en la viandetoj, sed ili ne estas nun aĉeteblaj, ili pendas tie por sekigi kaj nur je Kristnasko oni ricevos nun hektogramon popersone. Manko de vestaĵoj kaj ŝuoj ja ankaŭ estas granda. Sendaĵo de 600 paroj da ŝuoj, kiuj ĝuste alvenis al Narvik, ja ne sufiĉas por dek mil personoj.

La norvegoj malkaŝe parolis pri sia antaŭa dummilita kolero kontraŭ la sveda nacio, sed feliĉe ili ja fine komprenas, ke la teniĝo de Svedlando ja estis la sola imagebla. Kiu alie estus povinta ilin helpi pri la vivteno? Kiom oni ekzemple ĝojis pri la sveda supo, kiu savis la vivon de milo da infanoj! La ĉefo de "Sveda Helpo al Norvegujo" tamen rakontis, ke kiam poste ankaŭ venis la sveda lakto, la infanoj ne deziris la supon, nur lakton, kiu ŝajnas al ili la plej delikata, kion ili iam gustumis.

Dum mia vagado en Narvik mi subite min trovas sur loko, kiun oni verŝajne ne rajtas suriri, ĉar sur muro mi legas: "Direkcio de konfiskitaj posedaĵoj". Viro aperas, la estro de ĉi tiu institucio, kaj kompreneble demandas, kion mi deziras. Mi ja informas, ke mi ne estas iu spiono sed nedanĝera persono el Suda Svedlando. Kaj post kelkminuta interparolo li subite diras: "Mi montros al vi, kio ĝenerale estas malpermesita, la plej grandan germanan bunkron en Narvik." Estis interese enpenetri en ĉi tiun subteran konstruaĵon, iri tra mallargaj pasejoj al la diversaj ĉambretoj, kie oni laboris, dormis kaj kiuj estis meblitaj per bonaj litoj, seĝoj, tabloj, vestoŝrankoj, kie eĉ ne mankis vesthokoj. Malplenaj vermouthis-boteloj kaj ludkartoj atestis pri la distrado de la germanaj oficiroj. En angulo mi trovis malgrandan artefaritan kristnaskarbon. Do eĉ tie en la subtero oni bezonis iom da rebrilo de la sankta festo. Mi vidis specialan ĉambreton kun kvar geniaj aparatoj, kiuj provizis la germanojn per freŝa aero, la lokon por municio ktp kaj mi supreniris spiralan ŝtuparon al pafuro, de kiu oni havis same ravan vidaĵon kiel Hitler el Berghof.

Multe da milita materialo kaj ĉiajn veturilojn la germanoj postlasis ĉe la kapitulaco kaj sur la stratoj en Narvik oni vidas germanajn transport-aŭtojn kaj ankaŭ amasojn da ambulancveturilojn, kiuj deĵoras en ordinara trafiko.

La esperanta movado en Narvik ja tre malfortigis dum la milito. Verŝajne restas nemultaj esperantistoj, sed ili tamen esperas, ke iom post iom la tempo estos pli favora por Esperanto kaj ke ili fine trovos ejon por esperantaj kunvenoj. Mi mem antaŭe ne konis iun esperantiston en Narvik, sed svedo petis min transdoni saluton al malnova esperantoamiko, lerta kantisto, violonĉelisto kaj kelkfoje ankaŭ direktisto de la simfonia orkestro en Narvik. La kvar filoj estas ankaŭ tre mu-

zikemaj. Unu el ili, medicinisto, dum longa tempo suferis en Buchenvald, sed fine liberiĝis el tiu infero per la agado de Folke Bernadotte. Ankaŭ lia plej bona amiko liberiĝis, sed bedaŭrinde hejmenvenis freneza.

Mi iun vesperon aŭskultis en la preĝejo la simfonian orkestron de Narvik, kiu ekzercis por granda koncerto, en kiu servos kiel solisto Alf Schön, la plej fama violonisto en Norvegujo. Estis por mi plej mirinda koncerto. Kaj mi pensis: "Ĉi tie mi sidas en templo de urbo bombardita. Tie en la ĉefaltarejo antaŭ ne longe la germanoj konservis siajn provizojn da brando kaj vino. Sed la roloj ŝanĝiĝis. Anstataŭ kanona tondro kaj pafila krakado nun muziko de Grieg sonas sub la volboj. La lumo fine revenis al la norvega popolo."

La lumon salutis kun ĝojego ankaŭ la rusaj kaptitoj, kiuj en la tago de kapitulaco disrompis la barilojn kaj elkuregis el sia infero. Iu persono, kiu ĉeestis tiun momenton, rakontis, ke li neniam forgesos la vidaĵon de tiuj vivantaj skeletoj, kies okuloj brilas, kaj kiuj ne sciis, kiel montri sian ĝojon kaj dankemon.

Mi vizitis tiun militkaptitejon, kie la rusoj loĝis kiel bestoj kaj kuŝis en mallargaj stalfakoj, kaj kie multaj estis ĝismorte turmentitaj. Ekster tiu loko, ĉirkaŭita de altega pikdrata barilo, loĝis en relative komfortaj barakoj la germanaj gardistoj. Verŝajne oni bruligos ĉiujn barakojn pro risko de infekto.

En la proksimeco sin trovas la diversnaciaj tombejoj, inter ili la rusa, en kies mezo staras tomboŝtono kronita de granda ruĝa sovjeta stelo. Plej granda estas la germana kun miloj de krucoj, kaj vidante ilin oni sentas la samon, kion esprimis iu germana oficiro per la sola vorto: "Vane!"

En la mezo de la tombejo sin levas giganta nigra kruco, kiu staras kontraŭ fono de majestaj, neĝkovritaj montegoj. Sur la kruco oni trovas la vortojn: "Für alle." Kaj mi pensis: "Por ĉiuj." Estu tiu nigra krucomonumento por ĉiuj, nenur por germanoj aŭ rusoj, norvegoj aŭ angloj sed por ĉiuj, por ĉiuj, kiuj devis oferi siajn vivojn sur la altaro de l'milito. Staru ĝi kiel monumento de malhela tempo pasinta. Kaj estu ĉiama paco la sola regaĵo sur la tero!

FINO

Nybörjarekurs om sommaren.

Kan en nybörjarekurs anordnas på sommaren?

Härpå kan man svara både ja och nej. Nej, ty på sommaren vill alla vara fria för att njuta av sommarens härlighet. Men man kan även svara ja.

Om t. ex. några stycken samlades på en särskild plats för att fira sin semester, så kunde man där anordna under semestern en daglig kurs med låt oss säga två timmars undervisning på förmiddagen och två timmar på eftermiddagen, då skulle under en semester ganska goda resultat kunna vinnas, om en god lärarkraft stod till buds.

Och huru mycket rekreation och vila skulle inte kunna njutas på alla mellantiderna. Ville då läraren att eleverna skulle göra skriftliga övningar så blev ju fritiden mindre. Men detta sista finge inte bli obligatoriskt; men å andra sidan, om kursdeltagarna kommit tillsammans för att huvudsakligen lära Esperanto, så borde de ju kunna för en gångs skull offra bekvämligheten för att nå målet — vinna kunskap i språket.

En sådan kurs behöver inte bli av mera lokal karaktär, den kunde gott bli tillgänglig för deltagare från hela landet. Och nog skulle väl den personliga semestern kunna ordnas till förmån för deltagarna.

Den skulle också kunna sammanslås med en speciell för traktens deltagare som endast kunde samlas på kvällen. Alltså en fyratimmars på dagen och ev. en 1½—2 timmars på kvällen.

Samideano Albin Johansson.

Uppslaget kan för i år endast ge uppslag till en diskussion, ty nu äro alla semestrar för 1946 planerade och ingen är hågad att ändra sina planer för en aldrig så lockande kurs.

Vad vi nu kunna göra är att inbjuda till diskussion, hur en sommarkurs av antytt slag nästa år skulle kunna praktiskt ordnas så att den bleve givande och — lockande.

Red.



Hendrik Adamson

Karto de Hilda Dresen informis, ke Hendrik Adamson mortis 7/3 1946. Li naskiĝis 1891.

En belega somera tago 1932 mi sidis en la verdaĵo ekster la loĝejo de la fratinoj Dresen en Tallinn. Helmi alportis pakon da poemoj. Ili estas de nova esperantisto, ŝi diris. Li estas popollerneja instruisto, sed pro ftizo kaj aliaj malsanoj li devis forlasi la oficon. Kune kun sia maljuna patrino li loĝas en dometo en la kamparo, malproksime, izolite. Li ankaŭ estas verkisto, estone, poeto sed ankaŭ prozisto. Estona poeto tamen ne gajnas multe da mono. Ĉirkaŭ ilia kabano estas peceto da tero, kaj ili havas bovinon. Pension li havas, sed ĝi estas tre malgranda. Jen ĉio por la vivteno.

En la sama semajno mi skribis al li, kaj poste ni regule kaj ofte korespondis ĝis la germana okupo. Poste venis vivsignoj pere de Ruĝa Kruco, post la milito kelkaj kartoj, la lasta nur kelkajn tagojn antaŭ lia forpaso. Tiel mi bone konatiĝis kun lia vivo. Kaj tiu estis konstanta mizero, konstanta malsano. Longajn tempojn li devis resti en la lito. Foje li estis iom pli forta, povis esti iomete surpiede, eliri, malofte iomete helpi la patrinojn. La lastan jaron de sia vivo li tute ne povis forlasi la litojn.

Sed malgraŭ tiuj cirkonstancoj li spirite vivis, klopodis antaŭen, havis sencon en la vivo — en multe pli alta grado ol multaj aliaj en plej feliĉaj cirkonstancoj.

En 1934 aperis ĉe Literatura Mondo lia novelo Aŭli, reskribo en esperanto de estonlingva verko. Aŭli temas pri knabeto. Alian novelon, pri maljunulo, oni bedaŭrinde ne enmetis en la libron, sed oni poste aperigis ĝin en la revuo LM. Tiuj du noveloj pri la vekiganta homa konscio de infano kaj la velkanta de maljunulo donas profundan bildon de la homa vivo. Laŭ mia opinio ĝi estas enhance majstra verko, kvankam ŝatanĵoj de modernaj romanoj eble ne tre ŝatus ĝin.

En la sama jaro aperis dek poemoj de li en la antologio Dekdu Poetoj. Ankaŭ en LM aperis poemoj. Multe da poemoj nepresitaj troviĝas ĉe Hilda Dresen. Mi esperas, ke ĉiuj liaj presindaj esperantaj verkoj povos kune aperi.

Kelkaj vortoj de li mem finu miajn liniojn kaj karakterizu lin:

"Sed mi ne bezonas gloron,
nek flaton de vanta kortego,
en koro mi sentas doloron
de kruda hommortigo.
Kaj mi ne bezonas oron,
nek ĉiujn trezorojn de l' mondo,
sed sangon mi ploras ploron
pri homaj maljust kaj senhonto."

S. Engholm.

British Association of Blind Esperantists

lever upp och anmodar sina f. d. medlemmar att insända sina adresser till W. P. Merrich "Penso" Sheperton — närmast för distribution av den på Brailleskrift utgivna tidningen "Esperanta Ligilo".

Denna publikation, vars redaktör och utgivare är H. Thilander, Stocksund, Sverige, har under kriget måst läggas ned, men man samlar nu material och adresser för två extranummer, vilka som man hoppas skola leda till att tidningen på nytt kan komma ut.

Avskedshälsning.

Efter 12½ års vistelse i Sverige återvänder jag till mitt hemland, där nazismen rasat ut och där det nu finnes en chans för demokratiskt uppbygg-nadsarbete. Jag tackar kamraterna i SLEA och även vännerna i SEF och logen Esperanto för all den hjälp, jag fått under dessa år. Jag hoppas, att Esperanto skall bli en faktor av betydelse inom Tysklands kulturella liv, så mycket mera, som det internationella hjälpspråket är ett outhärligt instrument för nationalismens övervinnande. Denna tro, att Esperanto har en framtid även i Tyskland, är väl motiverad, ty redan ha Esperanto-grupper återuppstått inom de olika ockupationszonerna, bl. a. i Bayern, Hessen, Hannover, Hamburg och Mecklenburg. Det mäktiga Tredje Riket, alstrat av hat och oförnuft, orkade icke leva längre än 12 år, men vårt Esperanto, en ättling av förnuft och humanitet och just därför begäbbat av vissa "realister", har kunnat överleva två världskrig och en fruktansvärd terror. Det beror på oss, samideanoj i hela världen, huruvida Esperanto en gång skall bli erkänt som alla människors andra språk...

Ernst Bepperling.

LA MONDA FAMILIO.

El la esperanta korespondado. Antaŭ multaj jaroj korespondis la fratino de mia bofrato kun germana samideano. Li skribis ardajn amleterojn al sia sveda amikino nomata Alva. Samtempe ŝi ankaŭ korespondis kun germana samideano kiu vizitis ŝin en Hälsingborg, en la jaro 1926. Ĝuste dum ŝia vizito en la hejmo de sia sveda amikino, venis letero el Germanio al Alva.

Vidinte la leteron, la germanino tuj rekonis la skribkarakteron de la letero kaj diris, ĉi tiu letero ja estas skribita de mia fianĉo. Do la germana samideano estis iom trompema, sed ĉio finiĝis tiel, ke la du germanoj post kelka tempo geedziĝis, kaj Alva kelkajn jarojn poste edziniĝis kun angla esperantisto kaj nun loĝas en Anglujo.

Multaj jaroj pasis, kaj antaŭ kelka tempo venis letero al mia bofrato, adresita al lia fratino. La letero estis skribita en esperanto kaj venis el Egiptujo. Mia bofrato venis al mi kaj petis min traduki la leteron. La germana samideano, kiu antaŭ 20 jaroj tiel arde korespondis kun sia sveda amikino, nun sidante en Brita militkaptitejo en Egiptujo, petis sian iaman amikinojn provi interkontakti kun lia edzino, ĉar estis neeble por li sendi leteron al Germanio, kaj li volonte volus scii, ĉu ŝi vivas.

Unue mi skribis leteron al li en Egiptujo certigante fari mian plej eblon. Poste mi skribis al lia edzino, sed ĉar estis neeble pere de la poŝto sendi leteron al Germanio, mi sendis ĝin al la Savarmeo en Stockholmo, kiu promesis prizorgi la aferon.

Pere de la savarmeo, mi ricevis respondon el Germanio la 16 an de marto. En esperanto la germana sinjorino esprimis sian grandegan ĝojon ricevinte sciigon, ke ŝia edzo vivas kaj fartas bone, samtempe ŝi esprimis sian korvarman dankon por mia laboro. La letero ankaŭ enhavis germane skribitan leteron por la edzo, kiun mi kun kelkaj klarigoj, kiel mi sukcesis ordigi la aferon, sendis per flugpoŝto al Egiptujo.

Samideane
Thure Wendt.

Valborgsmässodans

När vi hade tillfälle ta del av fru Karin Hägglunds provisoriska redovisning för sitt vackra fögderi inom esperantisternas insamlingsarbete, stannade vi inför en post på 72: 29, om vilka Joel Wallberg i Torsåker meddelar "att de insamlats vid en dans den 30/4 46".

Esperanto kaj radio.

Sveda radio vidu sur la paĝo 59!

Dimanĉo 18.10 Bern (Svisujo). 47.28m. Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco. Paroladetoj de D-ro Privat. 21.30—22.00 Praha (Ĉeĥoslovakujo). 49.92m. kaj ofte 1571m. Politikaj, kulturaj kaj ekonomiaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.

Lundo 21.30—22.00 Praha. 49.92m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo). 21.50—22.00 Praha 470.2m. Prelegoj, intervjuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj pri la Esperanto-movado. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII. 22.00—22.15 Varsovio (Polujo). 49.06m. Informoj. Pola Radio, Koszykowa 8, Varsovio.

Mardo 21.30—22.00 Praha. 49.92m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo). 21.50—22.00 Moravska Ostrava (Ĉeĥoslovakujo). 325.4m. Informoj. Radio Moravska Ostrava.

Merkredo 16.00 Sofio (Bulgarujo). 352m. Parolado. 21.30—22.00 Praha. 49.92 m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo).

Ĵaŭdo 21.30—22.00 Praha. 49.92m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo). 21.50—22.00 Praha. 470.2m. (kiel je lundo).

Vendredo 20.30—20.45 B. N. R. O. Kortrijk (Belgujo). 202.3m. Parolado. Zender Kortrijk van de B. N. R. O., Rijnsestr. 36, Kortrijk. 21.25(?) EAJ 14 (Hispanujo). 200m. Kurso. 21.30—22.00 Praha. 49.92m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo).

Sabato 18.30—18.45(?) 3 SR (Aŭstralio). 238m. Novajoj. Nur je la dua sabato de ĉiu monato. 19.00—19.45(?) PRA 2 (Brazilo). Paroladoj pri Esperanto. Ministerio por Edukado kaj Saneco, Praca da Republica, Rio de Janeiro. 20.00—20.30 PRI 3 (Brazilio). 49.75m. Paroladoj pri Brazila vivo. "Brazila Kroniko", Radio Inconfidência, Belo Horizonte, Minas Gerais. 21.30—22.00 Praha. 49.92m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo).

Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo Mezeŭropa sed demanda signo post la horo signifas, ke ni ne havas precizan informon pri la horsistemo laŭ kiu oni kalkulas. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratul-leterojn kaj informojn pri ricevado.

LA INTERLIGILO.

En gammal bekant från förkrigstiden ha vi i dagarna haft glädjen hälsa på nytt. Det är **La Interligilo**, organ för det återuppståndna internationella förbundet av trafiktjänstemän. Förbundet, som tidigare tecknade sig Ilepto och huvudsakligen vände sig till post- och telegraf-tjänstemän, har nu utvidgats att omfatta all trafik och därför antagit namnet Internacia Ligo por Esperanto en Poŝto, Telekomunikadoj kaj Transporto **ILEPTT**. Styrelsens säte är som förut Paris.

Sverige har fått i uppdrag att ge ut nästa nummer av tidningen och för att möjliggöra detta har cirkulär sänts ut till gamla medlemmar och nya intresserade i järnväg, post, telegraf och telefon att omedelbart inbetala årsavgiften — 5 kronor — till T. Julin, Ileptta ĉefdelegito por Svedland, postgiro 17 23, Stockholm.

Vivas Esperanto.

En la tutan teron
flugas kara kanto
vastigante veron:
vivas esperanto!


El la suda maro
ĝis land' de lapono
inter nia aro
sama vorta sono.

Sama frata amo,
sama lingva helo,
sama kora flamo
de la verda stelo.

Vivas lingvo nia —
vidu, kiel forte!
Vivas dono Dia
neĉese, nemorte.

Martti Putaala, Finnlando.

Rumanio en Svedio.



Sinjoro T. Morariu el Stokholmo inspektis la 22an de majo Färna bruk, apud Skinnskatteberg, 100 rumanajn rifuĝintojn kaj la 23an de majo 50 rumaninojn en Säter kiel reprezentanto de la Rumana Legacio kaj Sveda Instituto. En ambaŭ lokoj li faris Esperantan provlecionon kaj disdonis ŝlosilojn. En Färna bruk oni ekstudis individue kaj en Säter komenciĝis kurso sub gvido de sinjoro E. Nilsson, kiun ni vidas sur nia bildo kune kun kelkaj el siaj lernantinoj.

PRINTEMPO EN ITALIO.

Vespero en Napoli estas kiel bela sonĝo, kiun oni neniam forgesos. Ĉi tie ĉe la plej mirinda margolfo del mondo, kie la naturo kaj la arto, historio kaj poezio kune faris ĉion eblan por atingi ion tute ĉarman! Ĉi tie sub sennuba ĉielo, ĉe la plej blua ondo, unuflanke bananta la piedojn de Vezuvio kaj aliflanke aliranta al Sorrento kaj la rokoj de la amata Capri! Jes, ĉi tie mi volas saluti la naskotagon de la itala printempo en pokalo da bonodora Falerno en la ĉarma Ristorante Zia Therezia apud la maro. Ĉarma lando, mirinda printempo!

Ĉi tie ĉio estas miksa kiel en abundokorno: burĝonoj kaj floroj kaj fruktoj samtempe estas donataj de la naturo, kiu ne konas ripozon. Oranĝoj kaj citronoj, fragoj kaj ĉerizoj, freŝaj terpomoj kaj verdaj pizoj kaj miloj da aliaj rikoltaĵoj, kiuj vekus admiron kaj envion ĉe sveda dommastrino, estas nun haveblaj ĉe nudpiedaj lazaronoj por kelkaj groŝoj kaj konsumataj kun supera indiferenco. Estas kvazaŭ la naturo ne havus alion por fari ol produkti tiajn frandaĵojn por maldiligentuloj. Kaj tamen ne povas esti alie en tiuj benataj regionoj. Ĉie oni renkontas entuziasmigajn vidaĵojn. Kaj ni, Nordlandanoj, ni rigardas ĉion ĉi tion pli intense ol aliaj homoj. Tiu ne eldirebla sopiro pri pli hela, pli suna, pli varma lando, kiu troviĝas en nia koro, tiu sopiro satigis ĉi tie tiom ke estas eble en nia materialista mondo. Pro tio, lasu nin longe rigardi, por ke iomete de tiu beleco kaj tiu sunlumo kaj varmo restu en nia koro kiel ĉarma memoro, kiel longa, bela sonĝo, kiel trezoro por venontaj tagoj, kiam malvarmo kaj malhelo venos al la homa korpo, interne kaj ekstere. Do, radiu, vi, varma suno, trembrilu vi, bluhelaj ondoj, ardu vi, oraj oranĝoj ĉe Posilipo! Bonodoru vi, milionoj rozoj! Eĉ la plej malgranda dozo de tiu belega, miksa en la sentojn de la plej malriĉa koro, devas fari miraklon. Kaj la maro, la maro, kiel mi amas vin, vi rava, blua maro! Dum horoj mi sidis kaj rigardis vin, ĝuis vian ravan blukoloron. Via kvieta susuro estas kiel kuracilo por vundita koro, mi sentis ĉe vi, kvazaŭ mi estus en alia pli bona, pli feliĉa mondo.

La suno subiras belege brilante. La fajreroj de ĝiaj lastaj radioj flirtas en la plej fantaziaj kometbanoj tra la arbedaro, kaj la maro ĵetas siajn longajn, malrapidajn ondojn kontraŭ la bordon, kaj sur la plej blua ĉielo de l'mondo ekbrilas milionoj da steloj en tiu fabela vespero. Mi ne scias kial, sed nur tiam mi sentis, kvazaŭ ĉio perfektigis, kaj ke mi vere estis en la sudo. Ĉio, pri kio la koro dolĉe sonĝis, en tiu momento efektiviĝis...

iriS.

IRLANDA NOV-HISTORIO.

Usona aŭtoritato deklaris, dum pritrakto de afero pri ŝanĝo de civitaneco de irlandano "ke la liberŝtato Irlando estas ĝenerale rekonata esti brita".

Kaŭze de tio la ŝtatestro, s:ro Eamon de Valera, faris paroladon kaj en "Irlando Vokas" la irlanda presoficejo dissendis eltranĉojn el la parolado, kiu ĵetas tre klarigan lumon sur la novan politikan historion de la sendependa respubliko Irlando.

S:ro de Valera diris: Ni posedas niajn proprajn Konstitucion kaj Civitanecan Leĝon. Neniu civitano nia ŝuldas ian lojalecon al Britujo au al la brita reĝo. Ni ne estas britaj ŝtatanoj kaj estas impertinenteco nomi nin tiel...

NOTO DE LA REDAKTORO DE "IRLANDO VOKAS": Estis milita konflikto inter Britujo kaj Irlando ĝis 11 Julio 1921, kiam la militagoj ĉesis kaj ambau partioj diskutis pacon. Sekvis packontrakto je 6 Decembro 1921 kaj la sekvanta jaron la de Britujo aprobita Konstitucio enleĝiĝis. Lau tiuj instrumentoj, Britaj soldatoj foriris el kvar kvinonoj da Irlanda teritorio kaj Irlanda Registaro anstatauis la britan administracion. Pro kio nur el kvar kvinonoj? Nu, iom antaue, en 1920—21, Brita Parlamento en Londono fondis 'Registaron' en la norda kvinono da Irlando, lau la Gubernado de Irlando Akto, 1920. Tiel ekestis "Northern Ireland". La jam menciita Konstitucio de 1922 provizis la nomon "Irish Free State" (Irlanda Libera Ŝtato) por la kvar kvinonoj, post apartiĝo de Norda Irlando. Tio ankaŭ provizis pri ĵuro je lojaleco al la brita reĝo, subskribota de ĉiu parlamentano, kaj pri Gubernatoro Ĝenerala, kiu loĝus en Dublino kiel Anstatauanto de la brita reĝo.

S-ro de Valera daŭrigis:

"Ni klarigis nian pozicion antaŭ multaj jaroj. En 1933, nia Parlamento nuligis, per leĝo, la provizon pri la ĵuro je lojaleco. Ni tiel montris, ke ni ne ŝuldas ian lojalecon tian. Dum la jaroj 1933—37, ni plue nuligis iujn provizojn en la Konstitucio kiuj eble sugestus tian ŝuldon. En 1936, ni nuligis la provizon pri la Gubernatoro Ĝenerala, kaj tia ofico ne ekzistas de post tiu jaro...
"POR KE NE RESTU IA DUBO PRI NIA SENDEPENDECO, NI VERKIS TUTE NOVAN KONSTITUCION KAJ SUBMETIS ĜIN AL POPOLA VOĈDONADO EN LA JARO 1937. La popolo akceptis ĝin kaj tiel leĝigis tiun Konstitucion, nian Fundamentan Leĝon, kiu do validas de la 29 Decembro 1937. Eĉ la nomon "Irlanda Libera Ŝtato" ni ŝanĝis—kaj ne estas korekta tia nomo de post tiu tago.

"Hodiaŭ ni estas **SENDEPENDA RESPUBLIKO.** Ni rekonas **NENIAN SUVERENECON KROM TIUN DE NIA POPOLO MEM.**"

HOLLAND.

Ordföranden i Arbetarnas Esperantoförening, spårvägsman Gunnar Rosell, har bevistat en internationell esperantovecka i Ackmar.

Inkräktarna lyckades dåligt med att utrota esperantospråket, berättar hr Rosell för en intervjuare från M. T. De arresterade ledare och upplöste bokförlag. Rörelsen blev hemlig, undervisningen bedrevs i slutna cirklar. Böcker som räddats undan fick ersätta nytryck.

I år räknar de fyra föreningarna, arbetarnas, de neutralas, katolikernas och protestanternas, 10.000 medlemmar, vilket kan jämföras med Sveriges på sin höjd 7.000. Standarden där verkar mycket hög, försäkrar hr Rosell.

Vår rörelse är mycket internationell och esperanto förblir ett perfekt språk vid sådana kongresser. Delta-gare från sju länder talade obehindrat med varandra utan tolk. Det var nästan gripande att höra den applåd som gavs när någon beklagade att inga tyskar var närvarande. De sade att de visste att det finns många goda tyskar, som de träffat i koncentrationsläger och under tvångsarbete.

Vi hade sammankomsten i oststaden Alkmar, och där fladdrade den stora fana svenska arbetare skänkte

holländarna. Jag var inbjuden och resan bekostades av värdföreningen.

I slutfesten deltog nära 600. Kabarén och teatern helt på esperanto varade i fyra timmar.

Germanio. En dankleteroj — al s:ino Anna Alamo — kaŭze de sveda helppakaĵo gesinjoroj Bünemann en Hamburg rakontas i. a.

Nia agado por Esperanto ĉi tie en Hamburgo nun tre vigliĝis. Mankas ankoraŭ nur papero, presaĵoj, lernolibroj, vortaroj k. t. p., kaj la trafikiloj estas tre nesufiĉaj, tiel ke ofte estas lacegige veturi per la tramo aŭ t. n. altvagonaro. Nun ankaŭ ĉiu volas ŝparsi siajn fortojn por transvivi tiun ĉi tempon Ankaŭ plan-dumoj kaj vestaĵoj devas ŝpareme esti uzataj, ĉar mankas ja je ĉio.

Kelkaj britaj samideanoj ĝojigas nin ĉi tie partoprenante la Esperantovivon en nia grupo. Tio tre kontribuas al akcelo de la kosmopolita celado kaj estas bona stimulo por novuloj.

Radio München bildar Esperantoklubb.

Esperantorörelsen i Tyskland har blivit så grundligt sönderslagen, att den ene esperantisten inte ens vet, eller rättare sagt visste, var den andre bor. Efter kriget har man emellertid sökt leta reda på varann igen. I München började det så smått med att någon klistrade upp affischer på husväggarna för att rikta förbipasserande esperantisters uppmärksamhet på sig. Bättre hjälp fick man emellertid, då man vände sig till radiostationen, som i sin utsändning hade ett utrop till alla esperantister att ge sig till känna hos den nybildade klubbens ordförande. Denna uppmaning hade så god effekt, att vid det första offentliga möte, som anordnades, kom inte mindre än 250 esperantister tillsammans för att överlägga om efterkrigstidens arbete. Man beslöt bl. a. att i både politiskt och religiöst avseende ställa sig fullkomligt neutral. Krafterna skulle ägnas åt anordnande av kurser samt åt att verka för freden genom esperanto. Denna esperantoklubb är den första, som trätt i verksamhet inom av amerikanerna ockuperat område.

Esperantista Fako de la Urba Biblioteko de Saint-Omer — E. Deligny. 48 pp. Ĉe la aŭtoro, 40 rue de Valbelle, St. Omer, (P. d. C.), Francujo.

Dank al la iniciatemo de la prizorganto, la aŭtoro de ĉi tiu verketo, la biblioteko de la 18,000-persona urbo Saint-Omer posedas fierindan Esperantan fakon. Ĉi tiu katalogo listigas ĉirkaŭ 2,000 erojn, inkluzive de pluraj pri aliaj projektoj. Kelkaj eraroj de preso aŭ fakto iomete deprenas de la efikeco, sed ne forigas la ĝeneralan indecon de la verko. Ankaŭ notinde estas, ke ĝi kompiliĝis kaj presiĝis dum la malhelaj tagoj de okupado. — E. D. D. (El Brit. Esp.)

Esperantistoj-ŝakistoj interesitaj pri ŝaka terminaro kaj pri aranĝo de ŝakludoj per korespondo, skribu al S-ro G. Shepherd, 30 Oakfield Rd., Gosforth, Newcastle-on-Tyne 3.

31:a Brita Kongreso de Esperanto okazos en Bristol 7—10 de junio 1946. Adreso: The BEA Congress, Cooperative Education Centre, Broad Weiz, Bristol 1.

Pacifista semajno norduja

okazos 7—14 de julio en la lernejo de Lysbro apud Silkeborg meze de unu el la plej belaj regionoj de Jutlando.

La tempo estos destinata por prelegoj de konataj pacifistoj, — i. a. el Anglujo, Nederlando kaj la nordaj landoj, — kaj ankaŭ ekskursoj en la belaj ĉirkaŭaĵoj estos aranĝataj. Prezo: nutrado kaj kunven-kotizo 25 + 10 danaj kronoj por la tuta semajno. Tranoktado en tendoj aŭ komunaj dormohaloj. Nur malmultaj ĉambroj estos disponeblaj. Pli detala programo kaj ĉiu necesa informo estos sendita al ĉiu interesato, kiu sin turnos al: Negocanto de "Aldrig mere Krig", Otto Jonasen, Strandvej 31, Svendborg, Danmark.

Finnlando

Oulu (Uleåborg) maj 1946: Stadens Arbetar-institut har i sitt arbetsprogram upptagit en särskild avdelning för esperantostudier. Som lärare i nästa kurs nämnes kontorist Allan Mehtonen, som med sådan framgång lett barnkurser i esperanto under vintern. Uleåborgs esperantoklubb har under vårterminen hållit kurser för vuxna, om vilka läraren redaktör M. Putaala, med berättigad stolthet berättar, att kursen med varje lektion fått nya deltagare.

Prag. Den första universella studentkongressen efter kriget hölls i Prag i november 1945, och den andra skall enligt meddelande i dagarna likaledes hållas i Prag, antagligen i augusti i år.

Förhandlingarna vid första kongressen fördes på fyra språk genom översättningar, vilka givetvis fördröjde arbetet. Man intresserades därpå av ett förslag om att pröva esperanto vid en kommande kongress, och på förslag av ett sällskap jurister söker för detta ändamål Radiocentralen där komma i förbindelse med juris studerande över hela världen, liksom jurister i allmänhet, vilka kunna vara intresserade av att delta i nästa kongress eller att åhöra radio-utsändning bl. a. på esperanto från eller om kongressen. Esperantister eller icke-esperantister, som ha intresse av juridiska studier, böra anmäla sig till **Radio Praha**, Esperant-disaŭdigo, Praha XII, Ĉeĥoslovakujo, varifrån närmare meddelanden erhållas.

Hungara helpo

Belan poemon ni ricevis el Budapeŝto.

La verkinto skribas i. a. jene en la aldona letero pri la donacpakaĵoj, alvenintaj al Budapest: "Nin surprizis la riĉa enhavo de la pakaĵoj. Kaj la videbla amo, kun kiu oni kolektis kaj vojaĝpretigis ilin. Kiamaniere ni kapablos inde danki al la samideanoj? La poemo — por kiu ni nun ne havas lokon — estas inda esprimi de danko. Ke niaj hungaraj samideanoj estas plenaj de laboremo, tio estas konstatebla el la alvenintaj leteroj; same estas pri la aŭtoro de la poemo. Tio estas despli altetaksebla, ĉar ilia esperanta laborvolo montras sin inter plorindaj cirkonstancoj kaj en tiu rilato ne estas escepto la aŭtoro de la poemo, pri kiu ni kuraĝas malkaŝi, ke post la ruinigo de sia loĝejo li posedas nur tion, kion li surhavas kaj ankaŭ tion iom post iom en neimagebla stato. Tio donas al ni okazon alvoki la atenton al la vest- kaj mon- kolektado, kies adresoj estas (por vestaĵoj kaj kuponoj) fraŭlino Alfhild Svedmark, John Ericssonsgatan 7, Stockholm K. Tel. 507459, kaj (por mono) poŝtgiro 20 12, Esperantoforbundet, Tegelbacken, Stockholm C.

Sinjorino Anna Alamo, kiu aranĝis la rapidan kaj sukcesplenan grandan forsendadon, ree sin okupas pri novaj sendaĵoj.

Gazeta esperantokurso. En Västernorrlands Allehandaperas esperanta kurso. La 23-an de Marto oni donis la duan lecionon. Se la lernantoj deziras, ili povas sendi la solvojn de siaj taskoj al "Esperanto, Säbråvägen 12, Härnösand", kie oni korektos la solvojn.

Litterära pris

American Esperantist gör sina kanadensiska läsare uppmärksamma på de tre pris, som Universitetet årligen utdelar för en översättning eller essä på esperanto. Priserna äro på 100 dollars och stå öppna för lärare och studerande vid universitet inom Stor-Britan-

Edwarda Kaminska:

EN LA FAŬKO DE LA MORTO

"Miaj travivaĵoj en la koncentrejoj Auschwitz-Birkenau kaj Ravensbrück kaj mia mirakla saviĝo pere de Sveda Ruĝa Kruco."

Prezo 1:— kr. + 15 % por imposto kaj afranko.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Fack 190 71 — STOCKHOLM 19 — Poŝtgiro 578

nien, bl. a. alltså för kanadensare (men ej för usanonoj).

I USA förbereder man en pristävling av liknande slag för scouter, som studera esperanto för att delta i världsjamborén i Paris 1947. Prisen skola stå öppna för scouter från hela västra halvklotet.

ABF:s verksamhetsberättelse för läsåret 1944—1945 har först nu kommit oss tillhanda. För oss är bland de många statistiska uppgifterna följande av särskilt intresse.

Språk	Cirklar		Medlemmar	
	43/44	44/45	43/44	44/45
Engelska	544	674	6.652	8.762
Svenska	378	400	3.857	4.127
Esperanto	66	72	695	721
Tyska	94	70	939	682
Franska	23	35	253	378
Övriga språk	6	44	50	408
Summa	1.111	1.295	12.446	15.078

Esperanto ligger alltså ganska väl till även i denna krets.

Två ABF-stipendier.

ABF har beslutat utdela två stipendier för deltagande i den finska sommarkursen 30/6—10/7 i Taipalsaari. Utsedd stipendiat är skyldig till ABF erlægga 30 kronor och erhåller gratis resa tur och retur hemorten — Taipalsaari samt även gratis uppehåll under kursen. Ansökning om stipendiet sändes till Svenska Esperanto Institutet, Tegelbacken, Stockholm C, före den 10 juni.

Malgranda Revuo nr 1/1946 — Kio M R estas? — Esperrevuo "kiu koncentrigas la spiritajn fortojn en nia movado, kolektas novajn impulsojn kaj novajn bonajn pensojn de unuopaj kaj redonas ilin al ĉiuj". (citaĵo el la antaŭparolo de n:o 1 de Malgranda Revuo).

Dum la legado de la nova nro mi devas konstati, ke la eldonanto vere plenumis kaj plenumas la intencojn. Stellan Engholm mem skribas pri la homo kaj pri la lukto de ĝi, li skribas pri la atingoj de la homa klopodo kaj pri la eblecoj ankoraŭ kaŝitaj, nur atendantaj la homracian lumserĉ-jetadon. "Pli ol takseble granda estus la signifo de esperanto, se ĝi fariĝus rimedo por kunigi ĉiujn bonajn fortojn en la mondo, kiuj volas pacon kaj evoluon de ĉio bona en la homoj". La citaĵo estas el artikolo de S. E. Paco kaj kulturo. Tiu citaĵo montras la plej indan direkton por nia movado kaj tute en konformo kun la intencoj de Zamenhof.

Estas mirige scii, ke tia bonenhava revuo nun povas esti sendata al ĉiuj partoj de la mondo, kaj ke ĉiu naciano povus legi ĝin se li lernis esperanton.

Unuavice ni svedaj geesp-istoj devas en dankemo al la eldonanto aboni la revuon por subteni lian klopodon daŭre eldoni Malgrandan Revuon.

Tulla Holfelt.

Utländska

Esperanto

Tidningar

HEROLDO DE ESPERANTO Kr. 9:—

AMERICAN ESPERANTIST Kr. 6: 50

LA VERDA FLAMO (Maroko) Kr. 4: 50

DANSK ESPERANTOBLAD Kr. 3: 50

INTERNACIA KULTURO (Bulgario)
Kr. 7: 50

Prenumerationspriset gäller för 1946 och kan inbetalas till

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Postgiro 578

Stockholm 19.

SVEDA KRONIKO

Falun. En la malnova kuprourbo dalekarlia ekzistas de kvardek jaroj klubo esperantista. Iam ĝi prezentis laboron, kiu laŭ la cirkonstancoj tiutempaj estis sufiĉe vigla. Dum la lastaj jaroj ĝi tamen "ripozis sur la laŭroj", la okazaĵoj en la mondo ankaŭ ja malagordis la kordojn de la entuziasmo. Dum multaj jaroj kursoj ne okazis, kaj la kunvenoj estis maloftaj. Kiel konate la dalekarloj havas "kapojn por si mem", kaj pro tio admonoj de federaciaj aŭtoritatoj pri ekagado donis neniun rezulton. Ni preferis mem elekti la konvenan momenton. Ke la klubo konsistas el ĉefe mezaĝaj homoj, kiuj preskaŭ ĉiuj havas familiojn, proprajn domojn kaj okupojn profesiajn, kiuj donas tre malmultajn liberajn horojn por partoprenado en idealistaj laboroj, efikis tute nature malhelpante al la esperanta laboro. Tamen tiu deko da anoj, kiuj apartenas al la klubo, estas preskaŭ ĉiuj lertaj esperantistoj, kaj okazas ke en klubaj kunvenoj ne estas unu sveda vorto aŭdata.

Tio estis ankaŭ la okazo, kiam sabate la 11-an de majo nin vizitis nia ĉekoslovaka samideano Josef Vitek, kiu estis tre ŝatata de la klubanoj. Pro la nekonvena tago kaj sezono publika parolado ne okazis, tamen, se li estus revenonta aŭtune, ni ne hezitus. Post la kunveno kelkaj el la anoj kun s:ano Vitek faris promenon en la urbo, kaj la esperanton parolanta aro vekis intereson. En la posta dimanĉo ni montris al li la vidindaĵojn de la urbo kaj helpis lin ekhavi materialon por gazeta artikolo en ĉekaj gazetoj.

Geji.

Josef Vitek besökte Tranås Esp:klubb 24/4 och talade vid offentligt möte å Folkets hus om Tjeckoslovakien under och efter kriget. Föredraget tolkades till svenska. Ett antal vackra baloptikonbilder jämte gramfonillustrationer belyste framställningen; livligt bifall. Samarbete med Reso ägde rum. Efter föredraget samkväm. "Per motorciklo tra tri landoj" såldes vid mötet. Viteks besök i sin helhet var av särdeles angenämt slag och för esperantosaken inspirerande.

R. A.

Lidköpings esperantoklubb havis 25/10 45—11/4 46 studrondon kun 9 partoprenantoj, el kiuj 6 translokiĝis al aliaj urboj. 12/4 jarkunveno. La estraro reelektita.

Vetlanda esp-klubo partoprenis la urban ekspozicion. Studrondo de oktobro. La klubo estas membro de "Amikaro de SEF".

Norrköpings esp.-klubb. 27/1 jarraporto kaj prelego de Jan Strönne, Malmö, distraĵo de partoprenantoj en la komenca kurso. Kursoj: Liceanoj (gvidanto: S. Ragnar), daŭrigantoj (A. Roos), popol-lerneja (Eva Tibblin), Jursla-kurso (Nils Johansson). La somerhejma asocio jarkunvenis 16/2.

Eksjö. Efter årsmötet 25/4 har klubben lagt ned arbetet för vårterminen för att återupptaga detsamma först i höst.

Göteborg. 17/4 S-ro Karl Vilborg disponigis al la klubo novan ejon en malnova bombŝirmejo, Övre Djupe-dalsgatan 11. La ejo konsistas el unu ĉambro, 4×11 m, antaŭhalo, studĉambro kaj kuirejo.

La esperantoklubo de Götaverken decidis sin turni al Radiotjänst kun peto pri enkonduko de esperanto en la svedan radioprogramon. — Kurso por komencantoj okazas en Redbergsskolan.

S-ro Fred Turner verkis por Östgöta Correspondenten longan artikolon pri la esperanta korespondado.

Karlskoga. "La Aglo": 7/2 Letervespero. 26/2 Prelego de J. Vitek. 6/4 "La Aglidoj", la junulara sekcio de

K-E-S La Aglo aranĝis kostumfeston. La gajaj maskitoj, ĉirkaŭ 50 personoj, reprezentis ekzotikajn, mezeŭropajn, nord-eŭropajn kaj eĉ afrikajn esperantistojn. La festo estis sukcesplena.

La kursoj de la estinta sezono finiĝis per kursfiniga festo la 28-an de aprilo. Dum la festo s-ro R. Lindahl parolis tre bonan paroladon pri Esperanto kaj aktualaj problemoj en Esperanto. Post la parolado s-ro R. Lindahl transdonis atestojn pro la elementa ekzameno al s-ino Margit Olsson kaj s-roj Sigurd Bergström, Karl Härdig, Gunnar Skagerstrand kaj Gerhard Karlsson, kaj premiojn al la popollernejaj kursfinintoj. Same estis transdonataj atestoj pro la trapasita komenca kurso al ĉiuj kurspartoprenintoj. La sukcesa festo daŭrigis per kaftrinkado, komunaj kantoj kaj dancado.

Dum monato majo okazis ŝanĝo de prezidanto. Anstataŭ s-ro R. Lindahl kiu kaŭze de multa laboro forlasis la prezidantan postenon estis elektita ing. Alderin Leijder.

Red.-kom.

Grupo Esperantista de Stockholm

La 6/2 ni ĝuis de la violonludado de s-ino von Regéczy-Dahlberg, akompanata sur la piano de s-ino Märta Samson; inter dancoj de Sarasate kaj Brahms ŝi ludis hungaran rapsodion komponitan de ŝi mem.

13/2 s-ro Bepperling rakontis pri la vivo kaj evangelio de Buddha.

La 20/2 s-ro Vitek, ĵus veninte flugmaŝine el Praha, komencis ĉe ni siajn prelegojn, kiujn espereble multaj grupoj povos aŭdi. La unua parto de lia prelego donis rapidan raporton pri la historio de Ĉeĥoslovakujo de post 1938. La dua parto, provizita de riĉega lumbildmaterialo, vojaĝigis nin tra Ĉeĥoslovakujo.

27/2 okazis demanda konkurso helpe de bildoj, muzikaĵoj kaj demandoj, kiujn la partoprenantoj mem rajtis fari; gvidanto estis s-ro S. Håkansson.

6/3 parolis ĉe ni d-ro Szilágyi pri "Ĉapitro de la historio kaj kelkaj komentarioj". Temis pri la nuntempa historio de Hungarujo. Post revuo de la antaŭa evoluo ĝis la unua mondmilito la parolanto donis bildon pri la intermilita periodo, kiam Hungarujo estis perdinta 3/4 de sia teritorio.

La saman vesperon ni gastigis Esperantostokholmon, kiu havis sian jarkunvenon.

La 13/3 ni havis muzikkoncerton. Violonludis s-ino von Regéczy-Dahlberg, plane akompanata de s-ino Märta Samson. Ŝi ludis serenadon de Ĉajkovski, hungaran rapsodion de Hubay kaj hispanajn dancojn de Sarasate. 20/3 ni aranĝis "Vivan Gazeton", en kiu i. a. s-ino Julin laŭtleĝis de ŝi tradukitan noveleton de Hase Z. "Serioza historio". 27/3 ni havis kantvesperon. F-ino Astrid Gregert kantis, akompanata de s-ino Regéczy-Dahlberg, tri kantojn, unu Esperantan kaj du svedlingvajn.

Lund.

18.3. La klubo havis jarkunvenon. Agada kaj revizora raporto estis aprobataj. La estraro por la jaro 1946: Olle Anderberg prez., Edvin Falck kasisto, Nils Persson sekr., Gust. Lidbjer v. prez., Sven Nilsson v. sekr., kaj Hans Petersson bibliotekisto.

S-ro Nils Persson estis elektata funkciis kiel reprezentanto al la jarkunsido de Skania Esp. Distrikto, kiu okazis en Lund la 24 an de marto 1946.

27.3. S-ro Josef Vitek vizitis la urbon Lund kaj faris paroladon pri Ĉeĥoslovakio. Li montris ankaŭ belegajn bildojn. Kiel bona interpretisto funkciis s-ro Hans Petersson. La ĉeestantoj dankis per fortaj aplaŭdoj.

N. P.

Malmö. 20/2. Pri "Palestina, la sankta lando" s-ino Atlas prelegis. Ŝi ilustris sian prelegon per bildoj, muziko kaj unikaj objektoj, kiujn ŝi aĉetis dum sia vojaĝo tie antaŭ kelkaj jaroj. 23/2 s-ro Kühlmann el Kopenhago parolis pri "La vivo en Danujo dum la okupado". 6/3 ordinara kunsido. Post la intertraktoj s-ro Kalmus montris lumbildojn de Estonio antaŭ la milito. Preskaŭ ĉiuj konstruaĵoj, kiujn ni vidis sur la bildoj, nuntempe estas detruitaj. 22/3 s-ro Vitek faris publikan prelegon:

"Ĉeĥoslovakujo en milito kaj paco", interpretatan de s-ro Ströme. 23/3 la muzikorkestro de la klubo aranĝis sved-ĉeĥan muzikvesperon. S-ro Vitek menciis pri kelkaj ĉeĥaj muzikkomponistoj. 30/3 laŭ propono de s-ro Kalmus komenciĝis nova programserio, nomata "Io pri ĉio". Li respondis por la vesperprogramo. Kiel helpantojn li elektis kelkajn klubanojn, kiuj kontribuis per memelektita temo. Tiel la programo iĝis tre varia.

H-dur.

Örebro Esperanto societo

5-3-46. Kunveno en Vintergården. Germana samideano, s-ro Rudolf Petri, parolis pri siaj travivaĵoj dum la milito. 19-3-46. Kunveno en Vintergården. I.a. tre vigla diskutado pri propagando por esperanto. Por konatigi la esperantomovadon kaj la klubon oni decidis anonci en la örebroaj gazetoj ĉiumonate. 24-3-46. Ĉirkaŭ 20 anoj partoprenis en la distrikta jarkunveno en Karlskoga. 2-4-46. Ordinara klubkunveno en Vintergården. Oni diskutis la aferon pri jarkotizo por geedzoj. Komisiigis al la estraro ekzameni la demandon. 14-4-46. La ĉeĥa esperantisto, s-ro Josef Vitek, prelegis en Vintergården pri Ĉeĥoslovakio kaj la ĉiutaga vivo dum la milito. 16-4-46. Ordinara kunveno. Kelkaj demandoj oni prokrastis al venonta kunveno, kiu okazos la 7an de majo.

R. L.

Örebro gubernia distrikto de Sveda Esperanto-Federacio ricevis novan estraron. Dimanĉe la 7-an de aprilo kunvenis la membroj de la estraro, kiuj loĝas en Karlskoga kaj decidis jenan labordividon: prez inĝ. Alderik Leijder, vicprez s-ro F. Ström, sekr inĝ. Yngve Lidbo, vicsekr s-ro G. A. Fritzell, kasisto konstrua submastro Artur Axelsson. Anstataŭantoj s-inoj Alide Leider kaj Elsa Lidbo. Ĉiuj estraranoj krom s-roj F. Ström kaj G. A. Fritzell estas el Karlskoga.

Söderhamns Esperantoklubb jarkunvenis 6/5 1946. En sia bonveniga salutparolo la ĝisnuna prez Runo Stridell eldiris, ke de nun, kiam paca tempo venis, la laboro devas intensiĝi. Samtempe li informis, ke li laŭ propra iniciato kaj proprariske invitis al la Söderhamna regiono la ĉeĥan prelegiston Josef Vitek, por ke li faru publikajn paroladojn. Tiun iniciaton la kunveno unuanime aprobis.

Novan estraron la kunveno elektis jene: inĝeniero Sven Ekström prez, popolinstruisto Runo Stridell, vicprez kaj studgvidanto, komercisto Karl Gustafsson, sekr, kontoristo Åke Wahlstedt, vicsekr, kaj provizejestro Hugo Löfgren, kasisto. Kiel revizoroj elektigis poŝtisto Ade Elffors kaj gimnaziano Esbjörn Stridell kun s-ro Abel Westling kiel anstataŭanto.

K. G.

Ystads Esperantoklubb. 21/3 jarkunveno. Kiel estraro estis reelektataj, prez H. Skog, vprez O. Hellberg, sekr Klara Waldén, kas Margit Svensson, sen speciala tasko J. O. Persson. Kiel revizorojn oni elektis Anna-Lisa Zimmerdahl kaj O. Olsson. 31/3 prelegis s-ro Josef Vitek por preskaŭ plena salono en la arta muzeo pri Ĉeĥoslovakujo dum milito kaj paco. Dro H. Skog lerte interpretis. Invitanto estis la loka sekcio de Interpola kunlaboro por paco.

Sveda radio.

Ni petas ĉiujn esperanto-gazetojn publikigi, ke la sveda radio dissendas esperanto-programon 14/6, 16/7 kaj 16/8 je 15.10 Grenviĉa tempo laŭ mallonga ondo 19.80 m. La programoj estos ripetataj je 1.10 la 15/6 resp 17/7 kaj 17/8 laŭ mallonga ondo 25.63, 31.46 kaj 49.46.

Samla vykort från jordens alla hörn är en rolig hobby.

Låt Dina vänner i fjärran land få vackra kort från Sverige i utbyte.

Använd våra vykort med esperantotext:

STOCKHOLM (10 olika), GÖTEBORG (2), MALMÖ (2), NORRKÖPING (2) och LAPP-LAND (2 olika). Pr. st. 0:15, 10 st. 1:20.

Fotografiska kort från Stockholm med esperantotext. Format 7×9 cm. 12 olika. Pr sats 1:—.

Brevkort med Sveriges karta. Tryckt i 3 färger. Avsändaren utmärker med ett x den plats, där han är bosatt. Detta kort torde intressera utlänningen i hög grad, då Sverige fortfarande är mycket uppmärksammat och — okänt. Pr st. 0:15.

Svenska nationaldräkter. De svenska nationaldräkterna ha alltid väckt starkt intresse i utlandet. Pr sats om 8 st. 1:20, pr st. 0:15.

Till ovanstående priser kommer 15 % för "oms" och porto.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO
Fack 190 71. STOCKHOLM 19. Postgiro 578.

VESPERKANTO

de Hendrik Adamson

Forpasis kure la juneco
Temp tro revema sen prudent —
Kaj estingiĝis purpurmeĉo
En malproksima orient.

Min tro lacigis voj ŝtonoza,
Sur dorso sidas zorgo-ĝib,
Mi iras, iras, senripoza
Vagulo, sub sortbata vip.

Min jam, post lastaj lacaj paŝoj,
Atendas tombo: frosta lit,
Kaj ĉirkaŭ kruco el kreskaĵoj
Del ter volviĝos sole vit.

La Internacia Asocio de Poŝtmarkkolektantoj

I. A. P. K. estas praktika Esperanta Asocio donanta al la filatelistoj deziratajn P. M. kontraŭ iliaj duobloj.

Estas dezirinde ke la svedaj esperantistoj-filatelistoj aliĝu ĉar I. A. P. K. ekonomie apogas la Esperantomovadon. Pro tio ili estas petataj kunhelpi la aliĝon de ne-esp. filatelistoj. Estas bona okazo por ne esp. utiligi la grandajn internaciajn favorojn, kiujn la esperantomovado donas.

Ĉiu membro ricevas senpagan anonceton en nia internacia filatela bulteno.

(Jarkotizo 5,00. Por junulo ĝis 18-aĝa 2,50)

Ĉiuj sciigoj de la sveda ĉefagento Bertil Zell, Box 50 85, Göteborg 5. Poŝtĉeka konto 24 09 21. Telefono 16 57 44.



"Jag lyckönskar Er
i allra högsta grad till MI SERĈIS
ORON... Ni sa, att det var en lättare
bok. Visst är den så, och den är inte
utfunderat litterär, men den är ome-
delbar och äkta litteratur, vilket är
ännu bättre. Bättre bok kunde ni inte
ha fått fatt på..."

Stellan Engholm.

Uttalandet gäller vol. III i serien STELO-LIBROJ:
"Mi serĉis oron kaj oleon..." Vi äro övertygade
om att den kommer att göra lika stor succes
som La Fino.

Priset är kr. 6:75 inb., 6:— häft.
För medlem av Literatura Klubo Stelo-Libro
kr. 5:25 inb., 4:50 häft.
(+ 15 % för skatt och porto)

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO
Fack 190 71. STOCKHOLM 19. Postgiro 578.

Från England, Frankrike, Holland:

**ILLUSTRERADE
ESPERANTO
BÖCKER**

VIVO DE ZAMENHOF
de Edmond Privat — inb. 133 sid. Kr. 4:50
ARTHISTORIO
de Hekler-Kalocsay — hft. 104 sid. Kr. 12:50
FABIOLA aŭ La eklizio de la katakomboj
de Kardinalo Wiseman — hft. 436 sid. Kr. 4:75
LA BATALO DE L' VIVO
de Charles Dickens — hft. 128 sid. Kr. 3:50
LANDOJ DE L' FANTAZIO
de Teo Jung — inb. 324 sid. Kr. 7,—
LA MARO
Rakontoj originalaj kaj tradukitaj — inb. 172
sid. Kr. 3:50

Priserna gälla med 15 % tillägg för oms o. porto
FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO
Fack 190 71. STOCKHOLM 19. Postgiro 578.

Svenska Esperanto-Tidningen

La Espero

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Redaktör: Eva Julin, Nytorpgsgatan 15, 4 tr. ög., Sthlm.
Tel. 42 53 84.

Prenumerationspris: helt år kr. 4:— . Lösnummer
0:40. Utkommer en gång i månaden.

Annonspris: 20 öre pr mm. Korrespondensannons:
1:50.

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto, Box
190 71, Stockholm 19. Tel. 31 65 01. Postgiro 578.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a., post-
adress: Box 19071, Stockholm 19 (Expedition:
Sveavägen 98.) Tel. 31 65 01. (Förlagschefen:
30 75 15.) Postgiro: 578. (Böcker, tidningar, kor-
respondenskurser o. s. v.)

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET (Sveda Espe-
ranto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel.
20 00 43. Postgiro 20 12.

Avgifter: Direkt ansluten medlem erlägger 7:50 kr.
pr år och erhåller tidningen gratis. Familjemedlem,
som ej erhåller tidning, erlägger 4:— kr. pr år.
Förening med kollektiv prenumeration å tidningen
för sina medlemmar erlägger för varje medlem en
årlig avgift av 5:— kr. För familjemedlem är års-
avgiften 2:— kr. Förening, som ej prenumererar
kollektivt å tidningen, erlägger för varje medlem
2:— kr. pr år. Varje ansluten förening erhåller ett
exemplar av tidningen gratis.

SVENSKA ESPERANTO-INSTITUTET, Tegelbacken,
Stockholm. Postgiro 5 15 11.

INTERNACIA ESPERANTO LIGO — IEL (Sveda
Teritorio): Ĉefdelegito Karl Wästfelt, Cedergrens-
vägen 27, Stockholm 32. Poŝtĉeka konto 15 12 88.
Kotizoj: Membro kun jarlibro kr. 3:50; Membro-
Abonanto 9:—; Membro-Subtenanto 18:—; Pa-
trono 90:—.

Nöden i Europa.

Esperantisternas hjälpaktion:

Kläder, skodon, strumpor, linne (till spädbarn), nål
och tråd sändes till fröken Alfhild Svedmark, John
Ericssonsgatan 7, Stockholm K (tel. 50 74 59). Ändrad
adress under juni och juli!

Pengar (redan en femma eller mindre kan bli till
nytta) sändes till Esperanto Förbundet, postgiro 20 12,
Stockholm.

**Redigeringen av nummer 7-8 avslutas
den 26 juni.**

YTONG

La malvarma norda klimato necesigas varmizolajn ekstermurojn. Ordinara
konstrumaterialo tial estis ligno, speciale en kamparo kaj urbetoj. La lignaj
konstruaĵoj tamen kaŭzis multajn brulakcidentojn.

Dank al la sveda invento "Ytong" oni nun je modera kosto povas konstrui
brulreziste sed varme en malvarma klimato. Ytong estas poroza betono, tiel
malpeza ke ĝi povas naĝi sur akvo, sed tamen fortika.

Svedlingva broŝuro havebla senkoste.

YXHULTS STENHUGGERI A.B.
Hällabrottet

